

Flandra **ESPERANTISTO**

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO-ONDERWIJS EN-PROPAGANDA

Orgaan van de **VLAAMSE ESPERANTISTENBOND**, POSTBUS 100, MECHELEN
Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschijnt maandelijks
Een en twintigste jaarg.
Nummer 9 (241)
SEPT. 1954

Vertegenwoordiger in Nederland:
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabeoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

LIDGELDEN:
* Leden: 100 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

39-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO

Haarlem (Nederlando), 31-a de Julio — 6-a de Aŭgusto 1954



(foto: Gé Leenneer, Haarlem)

*D-ro W. Drees, nederlanda Ministro-Prezidanto,
parolas ĉe la Inaŭguro de la 39-a U.K.
en Krelage-Huis.*

Raporti pri tia Internacia evento kaj kontentigi ĉiun leganton, tiun kiu partoprenis kaj tiun kiu forestis, estas ja neeble!

Ni tamen volis doni al ĉiu relative kompletan bildon pri ĉiu okazaĵo kaj, precipe, akcenti la diversecon de la okupoj de ĉiu pri ĉio, kvankam kompreneble mankos eroj, eĉ ne neglektindaj!

Ni tamen deziras nepre substreki la bonegan organizadon de la tuto — ĉar tio estas grava afero — tiel ke la partoprenantoj, pli ol dumil, respertis aŭ ekkonis tiun unikan atmosferon de Universala Kongreso, ĉie en la mondo la sama, kvankam la medioj tre ofte evidente malsamas: sur tiu kampo, kaj cetera sur la aliaj, la organizintoj plene sukcesis kaj meritas tutkorajn gratulojn.

Ni vere ĝuis E.- impreson: estas malfacile vortigi tiun senton sed vi komprenu ke alveninto en Haarlem deziras tuj „droniĝi” en ĝin: nu, la akceptejoj en la stacidomo mem, la verdaj flagoj ĉie, ankaŭ sur la aŭtobusoj urbaj, la Esperanto-menuoj, la samideanoj renkontitaj, kiuj ĝenerale parolis flue parolis nian lingvon — kvankam ŝajne estis ankaŭ t.n. turistoj (envere: E-parazitaj!) — ĉiel kontribuis al tio.

Ni memoras kelkajn aferojn, kiuj frapis nin kiel novaĵoj (eble ni estas tre senspertaj kaj eraras pri tio!): la specialan poŝtstampon, kiun havigis al ĉiu kongresano la „bus”-poŝtoficejo, kiun ni ĝis nun nenie renkontis, la vastan librostandon, kie estis aĉetebla novaj libroj kaj ankaŭ „antikvaĵoj”, kio ŝajne estas io specife nederlanda — la afablecon de la ĉef-vendistino (s-ino Mabeoone-Visser), kiun asistis multaj kunlaborantoj, oni ja en Esperantujo ĉiam renkontas!

Ni imagis al ni la zorgojn, la sindonon, la „heraĵojn”, kiujn postulas la „muntado” de Universala Kongreso: ni timegas ĉe la penso ke iam tia „katastrofo” povus okazi al ni!

Tial la organizintoj, la prezidanto, P. M. Mabeoone, la KKS Mason Stuttard kaj la Prezidanto de la loka Haarlema Grupo E. De Wolf, kaj iliaj geasistantoj, ŝajnas al ni homoj tiel eksterordinaraj, kvankam „nur” Esperantistoj. Ĉar tia estas Esperantujo!

Kaj tio en lando, — oni ja ripetis tion — kie la homoj kutimas bataladi (eĉ kontraŭ la akvo!), kvankam tio estas tipa karakterizilo de ĉiu Esperantisto.

Sed tio, ke ili estas veraj Esperantistoj, signifas por ni, kaj por vi, legantoj, la plej kompletan, perfektan, — ĉi-kaze merititan, — laŭdon!

La Kongresejo.

Mi aliris tiun urbon: situo 52.22 norda latitudo kaj 4.43 oriente de Greniĉo kun 165.000 loĝantoj.

Tion precize sciigis al mi la ampleksa, perfekta kongreslibreto — nu, libro kun siaj 178 paĝoj, kiun mi tre atente kaj plurfoje legis antaŭ la forveturo: mi notu ke pro la kompletaj kaj nepre klaraj komunikoj, mi senerare atingis Haarlem-on! Gratulojn al la redaktoro de tiu libreto, kvankam mi malkaŝe diru ke mi sentis min iom humiligata pro la rubriko „Utilaj Informoj”, kiu tiel bone helpis min: oni ja ĉiam parolas pri inoj kaj iliaj formoj, kvazaŭ viro estus tute sensignifa kaj eĉ malutila!

Elirante, kun karavano kiu partoprenis la antverpenan antaŭkongreson, ni tuj trovis en la stacidomo mem gvidantojn kiuj indikis al ni la ĝustan vojon. Kaj jen, ni ensaltis Esperanto-landon: Esperanto-standardoj eĉ multaj konstruaĵoj, samspecaj flagetoj sur la urbaj aŭtobusoj, Esperanto-menuoj en restoracioj ktp. Krome Esperanto ĉie (aŭ preskaŭ ĉie) parolata kaj ĝenerale tre flue kaj tiu unika atmosfero, kiun oni respertas eĉ ĉiu U.K.: oni tuj sentas sin hejme, retrovas malnovajn konatojn kaj tiel mirinde glate kaj ja nature faras al si novajn amikojn.

En la vasta kongresejo, kiu nepre modele funkcias, oni ricevis la nemalhaveblajn dokumentojn dank' al la terure ĉiam-bezonata kongreskarto (kiun mi je mia granda honto forgesis!) kaj povis admiri la poŝt-aŭtobuson, kiu ornamis niajn sendaĵojn per speciale kongresa poŝtstampo kaj manipulis en unu semajno pli ol 60.000 leterojn kaj presajojn (imagu!) kaj vendis al ni poŝtmarkojn kaj plenumis la kutimajn poŝtajn servojn...

Mi baldaŭ eksciis ke la harlema magistrato en multaj rilatoj, kaj ne nur morale, subtenis la organizadon de la Kongreso; mi aldonu ke la nederlanda ministro-prezidanto akceptis la honoran prezidantecon de la kongreso kaj persone ĉeestis la solenan inaŭguron.

La Estraro de UEA jam kunvenis vendrede kaj okazigis en sia ĉeesto gazetaran konferencon: multaj ĵurnalistoj partoprenis kaj ili reprezentis ĉiujn lokajn kaj preskaŭ ĉiujn gravajn naciajn gazetojn.

Interkona Vespere.

Vespere la interkona vespero logis ja ĉiujn alvenintajn kongresanojn al la vasta kongresejo: kia svarmo en kiu mi ne sukcesis retrovi kelkajn konatojn, kiujn mi nepre deziris renkonti. Kaj tio malgraŭ la iom „polica” fajfistemo, eĉ kiu post duonhoro oni estis devigata forlasi la tablon, kie oni ekkonis samideanojn kaj agrable babiladis, eĉ planis, por renkonti-nu-plu babiladi kaj plani ja same agrable.

Poste, ek al la lito, antaŭe agrable promente kaj poste dorlotante agrablajn sonĝojn.

La dimanĉo.

Kaj dimanĉe okazis jam je la 9-a kunveno de la internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (kiuj havas tre multe da libertempo...) kaj de la Akademio de Esperanto (kiu kompreneble ne devus meriti la saman „konstaton”).

Je la 11-a okazis en la vasta preĝejo Sta Bavo, baziliko el la 14-a jarcento, kun vere mezepoka atmosfero, protestanta diservo kun orgenludado de Klaas Bolt — la instrumento estas 5000-tuba! — himnokantado kaj la kutimaj ceremoniaĵoj.

Sekvis la neevitebla fotografado ĉirkaŭ la 12-a: nu, ne malgrava afero, fotografi tiom da homoj kiuj malsame alvenis, malsame aspektas kaj havas malsaman nacion! Sed la rezulto estis ja tre kontentiga...

de Haarlem, Mag. P.O.F.M. Cremers, la estraro de UEA kaj ties komitatoj, la prezidantoj de la kongreso la reprezentantoj de registaroj kaj de la landaj asocioj, nederlandaj eminentuloj i.a. s-ro Geluk, skabeno de Haarlem kaj la membroj de L.K.K.

Post solkanto de la bas-bariton Leon Combé („La Vojo” laŭ muziko de Friso Molenaar kaj „Al la Muziko” de Schubert), la urbestro de Haarlem klarvoĉe kaj en perfekta Esperanto bonvenigis la kongreson.

La vic-prezidanto de UEA, s-ro D. Kennedy, kiu anstataŭis la malsanan prezidanton E. Malmgren, salutis kaj dankis ĉiujn, aprobis la sendon de telegramo al la ĵus menciita prezidanto kaj deklaris la U.K. malfermita.

Alia Esperantisto, nu, „nur” la Ministro-Prezidanto Drees, tiam eldiris menciindan paroladon; alia prezidanto, tiu de la LKK siavice ekstaris malantaŭ la mikrofono kaj skizis la



(foto: Gé Leenheer, Haarlem — kiso: Heroldo de E. La nederlanda Ministro-Prezidanto, d-ro Drees, kaj la vic-prezidanto de UEA, D. Kennedy, aliras la podion por la solena Inaŭguro.

Solena Inaŭguro.

Poste ĉiuj kuris al la Krelage-Huis, ĉar flugis la tempo kaj kiu volus ne partopreni la Solenan Inaŭguron? Estas pene imagi ion tian: de la 2400 aliĝintoj, pli malpli 2.100 (de 1934 la nombro de la kongresanoj neniam estis tiom granda) ĉeestis... Kaj malgraŭe la 2200 lokoj ne sufiĉis en la vastega halo de tiu florborso, ornamita per palmoj kaj floroj, kaj kie ĉiu partoprenanto ricevis floron: ŝatinda esprimo de la simpatio de la komunumo Haarlem.

Tute malantaŭe de la salono la grandega kongresa flago sub kiu sur podio eksidis la „eminentuloj”: la ministro-prezidanto D-ro W. Drees, la urbestro

antaŭan nederlandan U.K. (Hago, 1920), dankis substrekante la apogon de la Harlema Urbeŝtaro kaj deziris al ĉiuj bonegan kongreson.

Poste sin sekvis la reprezentantoj de diversaj registaroj nome de Aŭstralio, Aŭstrio, Belgujo, Brazilo, Francujo, Germanujo, Nederlando, Norvegujo, Svedujo kaj Svislando; d-ro T. v. Gindertaalen, nome de Belga Registaro parolis jene:

„La Ministro pri Publika Instruado komisiis al mi ĉeesti vian kongreson, observi kaj noti ĉiujn okazajojn kaj verki raporton. Tial eĉ tiu inaŭguro mi havas, nome de la Belga Registaro, la honoron kaj, kiel Esperantisto, la profundan ĝojon saluti la 39-an Uni-

versalan Kongreson de Esperanto, kaj deziri ke viaj laboroj estu ne nur interesaj, sed ankaŭ fruktodonaj por la bono kaj plua disvastiĝo de la lingvo internacia."

Estis vera emocia momento kiam la honora prezidanto de UEA, Prof. Edm. Privat, suriris la podion kaj kiel vera oratoro eldiris sian festan, tre ofte aplaŭdatan, paroladon.

Kaj denove okazis salutoj de la diversaj reprezentantoj de la Landaj Asocioj, aliĝintaj al UEA, inter kiuj s-ro J. Soyeur (Reĝa Belga Ligo Esperantista), J. Jacobs (Flandra Ligo E-ista), d-ro A. Baur (Svisa E-Societo).

Kaj por fini tiun imponan inaŭguron, d-ro I. Lapenna, ne malpli elokvente ol Prof. Privat, paroladis kontraŭ la fono, kiun formis „en la mondo la sola standardo, kiu ne estas malkulita per sango”.

Ĉirkaŭ la 5-a ekkunsideis la Blindula Kongreso: 170 blinduloj kaj gvidantoj

Semantiko aŭ Teorio de signifado; Prof. D-ro C. C. Berg (Nederlando) pri: Kial la Popoloj estas Diferencaj; D-ro W. P. Roelofs (Nederlando) pri: La Mono, unu el la Fundamentaj Homaj kreaĵoj; Prof. D-ro Marcel Roose (Belgujo) pri: El la Historio de Asekuro; Lucien Laurat (Francujo) pri: Nunaj Aspektoj de la Eŭropa Ekonomio; D-ro Paul Neergaard (Danlando) pri: Interŝtata Kunlaborado pri Plantprotektado; Prof. D-ro Hugo Sirk (Aŭstrio) pri: La Longo de Lumondo kiel Natura Longunujo.

Kvankam ni ne havis la okazon aŭskulti ĉiujn prelegojn ni povis konstati ke granda publiko regule ĉeestis kaj ke kompreneble la nivelo de tiuj prelegoj, prezentataj de Universitatoj estis ege alta, tiel ke refoje pruvigis la neceso de tiaj aranĝoj.

Generalaj Kunvenoj de UEA.

Entute estis kvar tiaj kunsidoj, multnombre ĉeestataj kaj en kiuj la ĉe-

de la Akademio de Esperanto.

La prezidanto pritraktis la raporton de la Estraro, ampleksan broŝuron dissenditan kun la kongresa dokumentaro kaj lasis al tri estraranoj la taskon pli detale prezenti kelkajn punktojn: s-ro Oliver komunikis ke UEA kreskis per 400 membroj en 1953, ke Argentino venkis en la Internacia Konkurso (192 % de sia kvoto), ke la lastatempe aperintaj turismaj broŝuroj pruvas la evidentan turisman valoron de Esperanto; d-ro Kempeneers prezentis la ĝeneralan raporton pri la fakaj Asocioj, el kiu rezultis ke ili ĉiuj, precipe IFEF (Fervoĵista Internacio) kaj ILEI (Instruista Ligo) faris konsiderindajn progresojn: d-ro Lapenna raportis pri la Informa Fako de UEA kaj pri CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado) — UEA sendos al la Oka Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo du reprezentantojn.

Poste la ĉeestantoj prezentis rimarkigojn kaj konsilojn kaj laŭdojn al la Estraro.

La duan kaj trian ĝeneralajn kunvenojn prezidis d-ro Lapenna; oni esploris resp. la kulturalan kaj politikan aspekton de la temo: „La Internacia Lingvo antaŭ UNESKO”.

La kvara kunveno (prezidanto: s-ro D. Kennedy) precipe ekzamenis la laborojn de la diversaj fakaj kunvenoj dum la kongreso.

Kunsidoj de aliaj organizaĵoj.

Jam de la kongresa lundo, multaj kaj diversspecaj asocioj komencis sian laborojn en la kadro de nia Internacia kaj ĉiujara Esperanto-Evento.

T.E.K.A. (Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio) kunvenis sub la prezido de d-ro Kempeneers kaj i.a. esploris la firmigon de sia agado antaŭ Bologna, la kunlaboron kun J.E.M.A. (Japana E. Medicina Asocio) kaj ankaŭ la ŝanĝon de la nomo en T.E.M.A. La balotoj indikis kiel prez. Prof. Canuto kaj kiel komitatojn d-ron Kempeneers, prof. Yagi kaj d-ron Jovanovic.

I.F.E.F. (Internacia Federacio de E-Fervoĵistoj) kunigis 30 fervoĵistojn el 9 landoj; la federacio nuntempe havas 1.600 membrojn, estas prezidata de d-ro K. G. de Jong kaj havos sian venontan kongreson en Zürich (Svislando).

K.E.L. (Kooperativa Esperanto-Ligo) aranĝis, sub prezido de s-ro W. A. Gething, B.Sc (Econ.) siajn planojn kaj diversajn ekskursojn al koop. entreprenoj en Utrecht kaj Rotterdam.

I.K.U.E. (Internacia Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj) kolektis 150 personojn, kiuj esploris — ankaŭ en sekciaj kunvenoj — problemojn, rilatantajn al siaj diversaj interesoj.

K.E.L.I. (Kristana E. Ligo Internacia) havis sian jarkunvenon en ĉeesto de preskaŭ 120 anoj, sub prezido de s-ro E. Carlén (Svedujo). Oni esploris la protokolojn pri 1953 kaj starigis di-



(foto: Gé Leenheer, Haarlem — kliso: Heroldo de E.)

Ĝenerala vido pri Krelage-Huis, ĉe la impona solena Malfermo de la 39-a Universala Kongreso.

el 14 landoj partoprenis ĝin; ankaŭ tie estis pruvate ke Esperanto estas tre taŭga lingvo por interkomprenado.

Somera Universitato.

Vespere je la 8-a h. la Internacia Somera Universitato komencis, post inaŭgura parolado de la rektoro Prof. Berg. Prelegis tiun vesperon, d-ro I. Lapenna (Jugoslavio) pri „UNESKO” kaj Prof. d-ro Hideo Yagi (Japanujo) pri „La Problemo de la Loĝantaro en Japanujo”. La aliajn tagojn de la Kongresa semajno sin sekvis Prof. d-ro E. Privat (Svislando) pri „Orienta kaj Okcidenta Kulturoj”; Prof. D-ro Edward Collinson (Anglujo) pri: La

tantoj vikle partoprenis.

La unua estis prezidata de s-ro D. Kennedy, vic-prezidanto de UEA; salutis reprezentantoj de gravaj institucioj kaj organizaĵoj, i.a. F-ino M. Vermaas (Universala Ligo), T. Jung (Heroldo de Esperanto), Goldman (Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko); dro I. Lapenna informis pri salutoj de UNESKO, la Mondmovado por Mondfederacia Registaro, La Ligo de Societoj de la Ruĝa Kruco, la Movado Dulingva, la Internacia Konfederacio de Sindikatoj, la Unuiĝo, de Universitatoj, la Internacia Unio de Internaciaj Organizaĵoj kaj la Internacia Transporta Unio. Fine dro Isbrücker salutis nome

versajn komisionojn por glatigi la es-tontan agadon. En 1955 la jarkunveno okazos en Bologna, sed en alia malpli malproksima lando.

L.E.S.S. (La Esperantista Spiritista Societo) kunigis tridek personojn, kiuj aŭskultis la prelegon pri „Modernaj Metodoj de Psika Esploro” de s-ro H. W. Holmes.

P.L.I. (Pacifista Ligo Internacia) sub prezido de s-ro F. Parker ekzamenis la temon: „Ĉu kolektiva sekureco estas fidinda vojo al paco?”

U.L. (Universala Ligo) sub prezido de s-ro J. C. Isbrücker preparolis la protokolon pri la antaŭa jarkunveno; poste s-ro A. Cseh prezentis detalan raporton, post kio raportis la landaj reprezentantoj. Brila parolado de Prof. Privat estis la fino de la kunveno.

I.S.A.E. (Internacia Scienca Asocio Esperantista) havis kiel prezidanton d-ron G. F. Makink kaj aprobis diversajn raportojn kaj esploris plurajn teemojn rilatajn al ĝia celo.

E.I. kaj E.K.E.C. (Eŭropa Turismo; Internacia Komerca E. Cambro) faris ambaŭ diversajn decidojn kaj rekomendojn.

I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiu nuntempe nombras 1048 anojn, inter kiuj 1.008 organizitaj, diskutis la rilatojn kun Unesko kaj plenumis diversajn aliajn okupojn. Ĉeestis 109 membroj el 14 landoj. Oni decidis pri tri rezolucioj resp. al Unesko, al la Junulara Ruĝa Kruco kaj al la Aŭtoritatuloj en Nederlando, rilate promesitan instruadon de E. al estontaj geinstruistoj.

Ankaŭ okazis la kvara Jarkunveno de V.E.K. (Veterana Esperantista Klubo) sub la prezido de s-ro Bünemann (Hamburgo); ĝi havas 420 anojn kun pli ol 40-jara Esperantista laboro inter kiuj 90 jubileantoj kies aktiveco por E. estas pli ol 50-jara; du dekanoj, d-ro Maillard (Parizo) kaj s-ro Nylen (Stokholmo) esperantistiĝis en 1892.

Pri la Eŭropa Konsilantaro.

Gian kunvenon prezidis, d-ro Herrmann, gvidanto de la Eŭropa Kampanjo, kiu raportis pri ties strukturo kaj pri la evoluo de la lingvoproblemo antaŭ ĝi. Poste okazis vigla diskuto en kiu i.a. intervenis s-roj Petit, Laurat, Preibisch kaj d-ro Holtmann. Ĉiuvoĉe la kunveno aprobis jenan rezolucion:

„La kongresanoj, aŭskultinte kaj diskutinte la raporton de d-ro Herrmann pri la lingvoproblemo ĉe la Eŭropa Konsilantaro petas la Komitaton de UEA.

1. fari ĉiujn necesajn paŝojn, por ke UEA akiru legan staton ĉe la Eŭropa Konsilantaro por ke UEA havu la rajton oficiale enmiksiĝi en la pluan evoluon de la lingvo-problemo;

2. rekomendi al la membroj, kiuj aktive laboras en la naciaj eŭropaj movadoj, energie klopodi, ke la estraroj

de tiuj organizaĵoj siavice rekomendu Esperanton kiel solvon de la lingvo-problemo.

Informaj fakoj de Landaj Asocioj.

Prezidis tiun gravan kunsidon, d-ro I. Lapenna: li sciigis ke tia fakofunkcias nun en 25 landoj kaj kelkloke ege kontentige. Oni poste multe diskutis kaj sugestis kaj i.a. decidis organizi ankoraŭ pli multflankan gazetarservon okaze de la Bologna kongreso. Ni diru ke la aktuala estis tre bona, rapide funkciis kaj donis al la interesatoj tujan kaj rapidan materialon, cetere dankeme uzatin por la kunmeto de la aktuala raporto. La eldono de seslingva faldfolio, disdonota en internaciaj kongresoj ne-esperantistaj. Komuna slogano, uzota nur en E. estis diskutata: „Esperanto, la lingvo internacia, egala en la tuta mondo”. D-ro Lapenna fine menciis la libron „Faktoj pri Esperanto”, kie oni trovas ĉiujn eblajn detalojn uzeblajn por la defendo de Esperanto en diversaj medioj.

Publika kunsido de la Akademio.

La esperantista publiko montris grandan intereson por lingvaj demandoj, en la ĉeesto de la Akademianoj, la prezidanto ing. Isbrücker, s-roj Faulhaber, Cseh, Bünemann, Downes, Neergaard, Jung, Waringhien, Bugge-Paulsen, Collinson, Rotkvič kaj Söderberg. La unuan temon (elparolo de la vokaloj), bonhumore enkondukis s-ro Cseh kiam la dua temo pri la uzado de la pasivaj participoj (-ata kaj -ita). Prof. Waringhien, asertante ke li sekvas la Zamenhofan uzadon, defendis ilian netempan aplikon, kiam s-ro Jung, apelante la 6-an regulon de la Fundamento, atentigas pri la neceso konservi al E. plejeblan simplecon. Ankaŭ eldiris sian opinion s-roj Roelofs, Isbrücker, Wajsbium, Pragano kaj s-ro Isbrücker.

Kunsidoj de la Komitato.

Fakte la plej kompatindaj kongresanoj estas la Membroj de la Komitato, kvankam oni neniel forgesu tiujn kiuj plej multe laboras la LKK-anoj kaj la Estraranoj...

Por ke vi ekhavu ideon pri ilia „libertempo”, ni diru ke ili kunsidis lunde, marde, merkrede, vendrede — kiel komitatoj kaj ke ja ĉiuj krome kunsidis en diversaj komisionoj, kiuj forrabis multe da libera tempo, esploris la gravajn statutŝanĝojn, pri kiuj la landaj asocioj baldaŭ voĉdonos, aprobis la Estraran Raporton (tutan broŝureton) fiksis la laborplanon por 1954—1955, decidis pri honoraj membroj (nome C. C. Goldsmith, la ĝeneralan sekretario de UEA, la emeritan federacian ministron, d-ron H. Frenzel, kaj de la sekcia ĉefo d-ro K. Dworschak), pri la aliĝpetoj de Esperantistaj Asocioj (Aŭstria E-Federacio, E. Ligo de Nordameriko kaj Grupo de

E-istaj Edukistoj en Francujo) ktp.

Imagu ke estis pli ol dek nacioj reprezentitaj, ke ĉiu havis siajn personajn konceptojn, temperamenton kaj diskutmanieron — feliĉe nur unu komunan lingvon! — kaj ke, malgraŭe, ĉio finfine okazis harmonie kaj glate...

La Vesperoj.


Krom la Interkona Vespero, kiun ni jam aludis, la Filmprezentadoj (anstaŭantaj i.a. la Teatran Vesperon) kaj la „seriozaj” programeroj, okazis la teatra vespero, la Internacia Balo, la akcepto ĉe la Urbestro kaj la Orgena Koncerto.

La Arta Vespero (vere arta!) montris al ni en la Urba Teatro la faman Baledon de la Malaltaj Landoj en pluraj tre aplaudataj numeroj kaj la bonegan nederlandan deklamistino Nel Oosthout en „La Konferenco de la Bestoj” de Erich Kästner: ŝi vere, kvankam lerninte Esperanton en du monatoj, prezentis ion nepre indan kaj sukcesis, malgraŭ la relativa longeco de la teksto, kateni ĉiujn.

La oficiala akcepto en la Urbdomo estis rezervita al proksimume 200 invititoj. Post alparolo fare de la urbestro — en Esperanto! — kaj dankvortoj de s-ro D. Kennedy oni povis, ĝuinte kelkajn refreŝigaĵojn, viziti la antikvan konstruaĵon. La Radio, jam aktiva okaze de la Inaŭguro, profitis la okazon kaj intervjuis multajn personojn por eksterlandaj kaj transoceanaj disaŭdiĝoj.

La internacia balo okazis en la kutima gaja atmosfero de ĉiuj U.K.; ankaŭ kontribuis al tio la bela florumo, prizorgita de la komunumo Haarlem. La sekvantaro de la „naciaj kostumoj” vekis grandan intereson, precipe ĉar ili povis eskorti la florneon de Haarlem, kiu ĉeestis kaj eĉ alparolis la partoprenantojn en Esperanto.

La Orgena Koncerto, denove oferitan de la komunumo, ravis la spertulojn; la urba orgenisto George Robert ludis la faman orgenon, kiam f-ino A. Schoen, anino de la Haarlema Grupo kaj konata koncertkantistino, partoprenis en la programo.



La Busa poŝt-oficejo, kiu tiel „terure” aktivis dum la U.K.

Prelegoj pri Nederlando.

Cu mi ne menciu la kelkajn prelegojn. kiuj celis malkovri diversajn aspektojn de la invitanta lando kaj kiuj ĝuis multe da sukceso? Tiel estis organizitaj: 1. Karakteriza Nederlando (A. J. Kalma); 2. Rembrandt (s-ino Brankamp-Weber); 3. La Sekigo de la Suda Maro (C. B. Zondervan).

La Ekskursoj.

Ili estis — la oficialaj — diversspecaj kaj nepre interesis la partoprenantojn. Mi citu: Ekskurso O (Alkmaar, Volendam, Marken) kun 125 partoprenantoj sub gvido de s-ino Bakker-Smith, s-roj Kalma kaj Bontje; Ekskurso M (Aalsmeer-Den Haag-Scheveningen), sub gvido de s-ro Telling, tri aŭtobusoj. Ekskurso K.: 288 partoprenantoj, 7 aŭtobusoj, al Alkmaar-fermdigo kaj Volendam. La ekskursoj S (Amsterdam kaj Rijksmuzeo), T (Amsterdam) kaj U (Floraŭkcio Aalsmeer) okazis ĉiutage. Mi mem partoprenis „ekskurseton”, organizitan de la franca „buso”, de s-ro Petit: tio donis al mi la okazon gluti pli ol 400 km. en 12 horoj kaj konatigi kun s-ino Y. Labatut, Parizano, kiu kantas ĉiumerkrede en la Franca Pariza E-Kabaredo: nu, pli interese ol la glutado de kilometroj, kvankam la tuto estis ege instrua!

Solena Fermo.

Kaj jen ni jam atingis la finon de tiuj belaj tagoj, eĉ antaŭ ol ni ekkonsciis ke vere la 39-a U.K. jam svenis en la pasintecan!

Sabate, precize je la 9-a vicprezidanto D. Kennedy malfermis la tutlastan kunvenon kaj i.a. komunikis ke envenis la sciigo de la morto pro trafik-akcidento de Doktorino Wanda Zamenhof, la 30-an de julio: ŝi estis fidela Esperantistino, kiu bedaŭris ke ŝi ne povas partopreni la unuan U.K. kaj firme intencis ĉeesti la 40-an; honoron al ŝia memoro!

La kunsido unuanime akceptis jenan rezolucion, prezentitan de d-ro I. Lapenna:

1. La Esperanto-movado rekonfirmas sian pretecon per ĉiuj disponeblaj rimedoj ankaŭ estonte kunlabori por la realigo de la idealoj kaj celoj de Unesko;

2. La Kongreso esprimas sian profundan konvinkon ke la lingvaj malfacilaĵoj estas la ĉefaj bariloj al pli bona kompreno inter la popoloj kaj tial petas ĉiujn registarojn de la membro-ŝtatoj de Unesko subteni la Internacian Peticion favore al Esperanto, kiu estos pritraktata en la 8-a sesio de la Generala Konferenco de Unesko en Montevideo.

La rezultoj de la Debatkonkursoj kaj de la Belartaj Konkursoj plenigis nian koron per granda ĝojo ĉar F-ino H. De Ketelaere el Antverpeno gajnis la 1-an premion de la unua kun s-ro Svetomir el Beograd kaj s-ro C. Piron (Belgujo) meritis la 2-an premion de la Belarta Konkurso (Tradukita Poezio).

La Prezidanto LKK, s-ro P. M. Mabe-soone, dankis ĉiujn, kiuj iel kontribuis al la sukcesigo de la 39-a U.K. kaj komunikis ke oni sendis danktelegramojn

ANTAUKONGRESO en ANTVERPENO

Kun aprobo kaj en la nomo de B.C. K.E., la L.K.K. de la Beneluksa Kongreso Antverpeno-1953, akceptis organizi, dum la tri tagoj, antaŭ la mal-

fermo de la 39-a mondfesto Antaŭkongreson.

Sed baldaŭ evidentigis, ke la intereso por tiu ĉi Antaŭkongreso ne nur



(Foto kaj kiŝo „De Nieuwe Gazet”)

La Prezidanton, M. Jaumotte, ĉirkaŭas unua grupo da antaŭkongresanoj, en la interna korto de la Rubens-domo, kie vivis kaj mortis nia granda pentristo.

al la nederlandaj Reĝino kaj Ministro-Prezidanto kaj plie al la Cef-Ministro franca, Mendes-France, por peti subtenon de Esperanto en UNESKO.

Poste oni sin direktis al la UEA-ĝenerala Sekretario, C. C. Goldsmith, kiu fariĝos 65-jara kaj lasos la postenon, kiun li dum tiom da jaroj — inter kiuj multaj ege malfacilaj — tiel energie kaj konsciencplene okupis. Oni transdonis al li belegan delftan vazon el antaŭa jarcento kiel daŭran memorajon!

Fine s-ro Zacconi oficiale invitis la ĉeestantojn partopreni la 40-an U.K., kiu okazos en Bologna (Italujo) de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1955.

Kaj jen vere la fino kaj, kiel diris s-ro Kennedy: „Ni trapasis vere mirindan semajnon en Haarlem kaj denove spertis la grandan valoron de la internacia Lingvo Esperanto. Dum sep tagoj pli ol 2000 personoj el 28 landoj kunvenis, interparolis, amuziĝis, ĉiam komprenante unu la alian sen la helpo de interpretisto. Por ili, dank’ al Esperanto, la lingvaj bariloj ne plu ekzistis!”

La plenplena salonego el la tuta koro kantis la himnon „La Espero” kaj ĉe tio la 39-a U.K. fariĝis historia fakto.

Dankletero Kennedy.

„Kara S-ro Mabe-soone,

Mi ĵus alvenis hejmen el Nederlando hodiaŭvespere, kaj jen mia tria letero

- unu al D-ro Drees, unu al urbestro Cremers kaj nun al vi.

Mi iris post Haarlem al Leeuwarden, kaj tie denove ĝuis belan kongreson. Poste ses el ni, preskaŭ internacia karavano, vizitis Arnhem, kiu por ni britoj havas tute apartan intereson. Ĉie ni trovis la saman bonvolon kaj helpon kiel en Haarlem.

Mi nun kaptas la okazon esprimi mian koran dankon al vi, prezidanto de L.K.K. kaj al ĉiuj viaj kunhelpantoj, kiuj tiel sindoneme kaj bone preparis la imponan 39-an, eĉ ĝis la plej etaj detaloj. La tasko de L.K.K. estis ne nur granda sed streĉa, sed la atingitaj rezultoj montras ke vi ĉiuj frontis tiun taskon kun energio, pro kio la tuta kongresanaro kore dankas vin ĉiujn. Vi meritas la brilan sukceson, kiun atingis la 39-a, kiu, nun forpasinta, restos en la honorlisto de Universalaj kongresoj de Esperanto kiel unu el la plej brilaj, imponaj kaj sukcesplenaj ĝis nun. Do al vi ĉiuj, koran dankon kaj sinceran gratulon.

Inter la multaj kongres-aranĝoj kiuj kiuj tre plaĉis al mi, mi menciu du - unue la imponan solenan fermon, kiu treege impresis min, kaj due, vian lertan elekton, dum tia somero, de semajno kun vera kongres-vetero, kiu fakto supozeble montras ke la interrilatoj inter L.K.K. kaj la veter-dio estas tre amikaj. Gratulojn!”

venos el la sudaj landoj, sed ke ankaŭ partoprenantoj venos el la Skandinaviaj landoj, Svedujo, Norvegujo kaj Danlando, el kiu lasta aliĝis tuta karavano, dum ankaŭ Nederlando estis reprezentata.

Aliflanke Francujo, Jugoslavujo kaj Hispanujo sendis gravajn delegaciojn, kiam ankaŭ Anglujo kaj Germanujo sendis reprezentantojn.

Merkredon, la 28an de julio

La L.K.K., kiu konsistis el S-ro Maur. Jaumotte, prezidanto; S-ro Theo Van Gindertaelen, vicprezidanto; S-ro Henri Sielens, sekretario; S-ro Pittoors, kassisto, kaj S-roj Volders kaj Verstraeten, membroj, malfermis la akceptejon en „Witte Leeuw”, la antaŭtagmezon kaj multaj efektive jam alvenis frue dum tiu ĉi tago.

Tiel ke S-ro Jaumotte iĝis la gvidanto de multnombra grupo, kiam li, posttagmeze, iris tra la plej gravajn stratojn de la urbo, al la Rubens-domo, kiun li detale vizitigis.

Post tiu ĉi vizito, sekvis la Oficiala Malferma Kunsido, dum kiu la prezidanto bonvenigis ĉiujn kaj dum kiu ankaŭ unu membro de la diversaj delegacioj alparolis la ĉeestantaron.

Inter ili, kiuj tiel diris salutan vorton ni citu: S-ino Manojlovic (Jugoslavujo); F-ino Romanat (Francujo) S-ino Graeffe (Usono), S-roj Love (Anglujo), Schörrich (Germanujo), S-ino Svenson (Svedujo), F-ino Van Vliet (Nederlando) kaj S-ro Kühlmann (Danujo).

Poste okazis, per prezentado de lum-bildoj kun registrita parolata teksto, vasta promenado tra Antverpeno, ne nur tra la avenuoj, placoj kaj stratoj, ne nur tra la haveno, sed ankaŭ en la plej gravaj monumentoj mem, kies artrezoroj estis detala montrataj. Diversaj membroj de la loka Grupo „La Verda Stelo” partoprenis al la registro, bonege prizorgata de S-ro Montmirail.

Poste, laŭ sama maniero, estis aŭdigataj la popularaj kantoj, kiuj helpas agrablighi la vesperojn de la antverpena samideanaro. Kaj kiam la dana kaj franca delegacioj estis aŭdigintaj folklorajn kaj aliajn kantojn, ili tuj povis aŭskulti sian propran voĉon re-aŭdigatan.

Ĵaŭdon, la 29an de julio

Ĵaŭde matene, tre akurate, granda parto de la kongresanaro venis al la kunveno por aŭskulti, dum Kultura Horo, prelegon de S-ro Hector Vermuyten, pri „Kristoforo Plantin kaj la Humanistoj”.

Prezentita de D-ro Van Gindertaelen, la paroladisto klarigis, kiu estis Plantin kaj kiel la fama presisto rilatis al la humanistoj.

Kune, ĉiuj poste rapidis al la Muzeo Plantin, kie S-ro Jaumotte reprenis la

gvidadon, por la rondirado tra tiu ĉi bela kaj interesa patricia domo.

De tiu ĉi muzeo, oni tagmeze iris al la Urbdomo, kie, post bonvenigo flanke de S-ro Claessens, la direktoro de la Sekretariejo, okazis rondirado tra la belegaj kaj riĉaj salonoj.

Posttagmeze, ĉiuj rekunvenis ĉe la enŝipigejo apud la Steen-pontono, a-por ekskurso sur la Skeldo kaj vizito al la Noordkasteel aŭ Nordkastelo, agrabla somer-kunveno de la amatoroj de naĝado kaj akvo-ludoj. Ankaŭ la tunelo sub la Skeldo ne estis forgesata.

Vespere ĉiuj kune ĉeestis bone prizorgitan kabaredvesperon, kiun partoprenis: S-roj Ameryckx, kantisto; Hector Vermuyten, deklamisto, Pierre Peelman, la enkondukanto de la diversaj numeroj kaj kantisto, kaj S-ro nok, kiu deklamis kaj prezentis skeĉon kun F-inoj J. kaj M. Ameryckx, kiuj ankaŭ bele dancis, dum F-ino Clara Peeters akompanis ĉe la pianoforto la diversajn kantaĵojn kaj dancajn numerojn.

Kantoj, deklamadoj kaj skeĉoj akiris ĉiujn grandan sukceson kaj bisoj estis postulataj.

Agrabla... kaj varmiga dancado estis la konkludo de tiu ĉi dua tago.

Vendredon, la 30an de julio

La vendreda tago komenciĝis per vizito al la FORD-fabrikejoj. Gvidataj de S-roj Jaumotte kaj Van Gindertaelen, la kongresanoj, en du grupoj, veturis eksterurben kaj estis akceptataj en la Fabrikejo de S-roj Huybrechts kaj Boffejon, ambaŭ fakdirektoroj, kiuj la unua en flandra, la dua en esperanta lingvo bonvenigis la vizitantojn.

Tre detala vizito permesis al ĉiuj konstati kiel aŭtomobilpecoj, alvenintaj per ŝipoj tute apud la fabrikejo, estas, en minimuma tempo, kunigataj por ekesti, iom poste, bela aŭtomobilo kiu, per propraj fortoj, forlasas tuj la laborejon por veturi al la finkontrola sekcio.

Post libera posttagmezo, ĉiuj rekunvenis je la kvina en la „Witte Leeuw”, kiu estis la ĝenerala renkontejo dum tiuj ĉi tri tagoj, kaj aŭdis paroladeton de S-ro Henri Sielens, pri la „Konstruopolitiko” de la antverpena urbestro.

La celo de tiuj ĉi klarigoj estis prepari la kongresanaron al vizito farota tuj post la

Inaŭguro, de la nova D-ro Zamenhofstrato

Estis sub griza ĉielo kaj dum pluveto ja falis, ke okazis, en la suda Kielkvartalo, la inaŭguro de la strato, al kiu la urbestro, — en 1953 okaze de la Beneluksa Kongreso, — decidis doni la nomon de nia Majstro.

S-ro Jaumotte tial iom simpligis la ceremonion. Li memorigis pri la cir-

konstancoj en kiuj estis akirata tiu ĉi decido de la urbestro kaj deprenis tiam la esperanto-flagon de la stratindikilo, kiu, ekde tiu ĉi momento, do memorigas la antverpenan publikon pri D-ro Zamenhof.

Ĉiuj tiam kune trairis la straton kaj promenadis ĝis la apuda urbkvartalo en kiu, dum la lastaj jaroj, estis konstruataj multnombraj domegoj, kiuj formas sekcion, en kiu grava parto enhavas domegojn kun 12 etaĝoj.

Tie ĉiuj estis akceptataj de S-ro Bastiaenen, direktoro de la societo „Huisvesting-Antwerpen”, kiu donis ĉiujn klarigojn kaj kiu pilotis la grupon en tiu domaro, el kiu unu portas la nomon de la iama gvidanto de la Societo, S-ro Frans Schoofs, la mortinta prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista.

Ĉiuj iris ĝis sur la 12a etaĝo, de kie ili ĝuis la plej belan panoramon pri Antverpeno.

Vespere, ĉiuj retroviĝis por la adiaŭna kunesto.

Post lasta bonveniga vorto de la prezidanto al tuta grupo de nov-alvenintoj, kiuj ne kapablis ĉeesti la tutan antaŭkongreson, sed kiuj tamen haltis en Antverpeno dum la antaŭtago de la Kongresmalfermiĝo en Haarlem, disvolviĝis lasta programo, kiu enhavis diversajn filmojn, unu instruan pri la franca lingvo, de S-ro Van Bael, kiu promesis pristudi eventualan adaptigon al Esperanto; alian, pri la Universala Kongreso en Oslo; kaj trian, dediĉatan al muziko kaj kanto. S-ino Lecat, inter la diversaj prezentadoj, legis amuzajn novelojn pri-geedzajn.

Fine, S-ro Jaumotte, en entuziasmiga parolado, eldiris la konkludan vorton de tiu ĉi Antaŭkongreso. Dankinte ĉiujn siajn kunlaborantojn, li diris la ĝojon, kiun ili kaj li havis, preparinte kaj efektivigante tiujn ĉi tri esperanto-tagojn kaj ankaŭ sian esperon, ke ĉiuj partoprenintoj ĝuis ilin plene.

Li tamen esperis ke la franca dirajo „Partir, c'est mourir un peu” „Foriri estas duonmorti” ne estos vera por tiu ĉi kongresanaro, kiu iros al Haarlem, kie ĝi havos okazon plengui la grandan jaran mondfeston de la esperantistaro; kaj al la novuloj, kies unua kongreso estos, li deziris ke ili, ankoraŭ post multaj jaroj, kun dankema, agrabla sento, reprenos pri la Kongreso de Haarlem, kaj ankaŭ, iome la antaŭkongreso de Antverpeno.

Kaj sabate matene, preskaŭ ĉiuj kune forlasis Antverpenon, per la vagonaro de la 9.44 akompanataj de diversaj belgaj amikoj kaj membroj de la L.K.K., inter kiuj ni citu speciale S-rojn Van Gindertaelen, De Kete-laere kaj Verstraeten.

Pasis tri belegaj tagoj, kiujn baldaŭ forgesos nek la organizintoj, nek la partoprenintoj.

A. K.



1955 V.E.B. — JUBELJAAR

Ter gelegenheid van het jubeljaar biedt het Vlaams Esperanto Instituut aan al de LEDEN van de V.E.B. op sommige werken een gevoelige prijsvermindering aan. Zie de catalogus hierbij. Wij danken het Instituut hartelijk voor deze zeer praktische sympathie-betuiging, en wij hopen dat onze leden ten volle van deze enige gelegenheid zullen gebruik kunnen maken.

Voor de jongere Esperantisten die een Esperanto-bibliotheek wensen aan te leggen, kunnen wij de hiernavolgende werken, uitstekend van inhoud en mooi verzorgd, aanraden:

Judoj sen mono; Pinokjo; Saltego trans jarmiloj; Tipoj kaj aspektoj de Brazilio; La Fino; Gösta Berling.

Ne hezitu, sed profitu!

JUBILEA JARO

Ni ne dubas pri la fakto ke ĉiuj anoj de F.L.L.E. konas la naskigdaton de nia kara Ligo: en 1930 ĝi ekestis, kaj kvankam ĝi travivis militegon, kiu haltigis ĝian rapidan elkreskon, ĝi ankoraŭ estas tute juna kaj freŝa kaj preta por disvolviĝo.

Tial la estraro dum kunveno en la gastama hejmo de nia vicprezidanto D-ro Couwenberg (kvankam la geedzoj Couwenberg estas iom pli aĝaj ol 25, iliaj koroj tute bone harmonias kun lanugbarbuloj!) speciale preparolis la planojn por rememorigi tiun datrevenon, kaj la eblojn por stimuli la agadon de gemembroj kaj sekcioj.

Ek de tiu numero aperos, kiel rezultato de tiuj preparoloj, sub la titolo „1955 V.E.B. — jubeljaar” speciala rubriko en kiu ni anoncos la avantaĝojn kiujn la gemembroj ĝenerale, aŭ kelkaj kategorioj aparte, ĝuos okaze de tiu jubilea jaro. Krom tio, ni kompreneble solene jubileos dum la jar-

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenstraat 29, Kortrijk.
Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 3345 (dum la ofichoroj).
Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.
Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)
Koresponda kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht

kunveno en Utrecht (pentekosta kongreso 1955), kie ni honorigos la pionirojn kiuj devige forlasis nin kaj tiujn kiuj restis fidelaj dum tiu longa tempo.

Multaj aliaj iniciatoj estas efektiviĝotaj, sed ni ne povas plenigi tutan paĝon de F.E. nun, kaj cetera estas pli bone ke ni ĉiunonate povos rememorigi nian jubileon per nova sciigo kaj nova alvoko.

La estraro esprimas la deziron ke ankaŭ la liganoj ĉion faru por helpi la indan rememorigon de la ekesto de Flandra Ligo Esperantista; ni speciale atendas la organizon de multaj kaj sukcesaj kursoj, de grandskala varbado antaŭ la fino de la jaro k.t.p.

Tiuj liganoj kiuj kapablas finance helpi nin, ĉar kelkaj aranĝoj necesigos elspezojn, bonvolu aliĝi tuj kiel subtenanta membro por 1955 (kotizo de 150 F).

Kaj la kaso ankaŭ kaj spite de tiu jubilea festo fartus bonege se ĉiu membro varbus en sia familio unu membron enloĝantan (25 F, ricevas „De Esperantist”).

La prezidanto de F.L.L.E. kaj la tuta estraro kalkulas je via helpemo por sukcesigi en ĉiuj vidpunktoj nian jubilean jaron.

VARBADO 1955.

Kiel kutime ni sendas la gazeton ĝis la jarfino senpage al ĉiu novaliĝanto.

OOSTPRIESTERHULP, Esperanto-sekcio.

Kiu, volas helpi per korespondado kaj alsendo de esperantaĵoj? Skribu al abato L. Muller, Collège de l'Immaculée Conception St-Vith, Belgujo.

FONDAJO MONTEVIDEO.

Kelkaj geesperantistoj
el Gent: 106 fr.

Plaatselijk Nieuws

Kvankam estis libertempo, oni ne strikis sur ĉiu kampo: estis kelkaj gemembroj de F.L.L.E. aŭ R.B.L.E. kiuj nepre ŝatis plu aktivi.

Tiel naskiĝis al Geamikoj Maertens-Mallet, el St Kruis la 24/7/1954, tria fileto: Guido.

Krome geedziĝis 18/8/54 en Antverpeno S-ro Roger Jaumotte kaj F-ino Félicie Meulemans, kaj fine agis same, la 1/9/1954, advokato G. Deckers kaj F-ino Estella Vermuyten.

Al la feliĉaj gepatroj en la unua kazo, al la gepatroj kaj junaj geedzoj en la aliaj ni prezentas niajn korajn gratulojn kaj bondezirojn.

BRUGGE: De afd. heeft zich verheugd in het huwelijk van een harer trouwste leden, de Hr. Fred. Ramon, op Zaterdag 10.7.54 in de echt getreden met Mej. Chr. Bonheure. Spijtiger is het wel dat het jonge gezin onze Brugse stede vaarwel heeft gezegd om zich te Mechelen te vestigen!

Kortrijk. La 22-an de Julio mortis S-ano Maelfait Maurice, 51-jara, unu el la malmultaj veteranoj kiuj restis ankoraŭ ĉiam fidelaj al la iam floranta klubo de tiu urbo, kaj membro-abonanto de Fl.Ligo.

Li venis al nia movado antaŭ 26 jaroj, tuj post la starigo de la loka asocio en kies medio li aktive agis kaj dum kelka tempo, funkciis kiel estrarano. Ankaŭ al preskaŭ ĉiuj antaŭmilitaj kongresoj de Fl.L. li partoprenis.

Al la funebranta familio, ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn.

Anonceto

Komencantoj deziras korespondi kun komencantoj el ĉiuj landoj. Interesiĝas ankaŭ pri interŝanĝo de p.m. unutag-kovertoj, il. pk.: S-ro C. WALTERS, „LOOMBAH”, CUMNOCK (NSW), Aŭstralia.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915,
Schr. cursus voor gevorderden: H. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm. Mej H. M. Mulder, Zilvermeuwstr. 29 Badhoevedorp
Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 171/172: F-ino C. Boute, Blankenberge, por V.E.B., kaj por L.E.E.N.: f-ino J. v. Eeden el Putten.

SOLVOJ

173. peruko; sufloro; oscedi; lacerto; lactuko; lariko; trunko; resumo; satiro; rivalo; bremsi; limako; ĝangalo; komizo; demando; galono; latiro; madono; cirklo; lampiro; sprono; medalo; maniko; sekalo; litero; anĝelo; kimono. Post alkutimiĝo doloras disiĝo.

174. *Horiz.*: mamon; viando; ir; randidoj; traf; pra; ironi; ĝarden; rek; eco; mi; ia; ade; eta; glim; peranto; leg; mut; iĝ; tip; ŝuo; deĉifr; trajn nuk; ar; ulo.

Vert.: martirig; id; real; ĝen; manio; il; ĉu; Amerik; nupied; or; cep; tra; vojaĝo; emi; erupt; aŭtoritat; ru; an; ŝal; diadem; teujo; orf; nizo; on.

175. ELLASU LITERON

el ĉiu el la subaj vortoj kaj intermiksita la postrestantaj literojn por trovi novajn vortojn. La ellasitaj literoj formas proverbon.

Donaci; sekreto; kabano; tonelo; pekulo; kartono; drakmo; ampolo; sklavo; paliso; laktejo; kamelio; mistero; panero; trofeo; retino; borilo; grimpi; iomete; turniro; redoni; troigo; skarabo; skvamo; butero; lekanto; spektro; paroli; librejo; sultano; saturi; pioniro; trioleto; defali; karato; aktoro.

176. KRUCVORTENIGMO

Horizontale. 2. en okulo(R); maldika pastaĵo(R). 3. bordero ĉe vesto(R). 4. restadi malaktiva(R); esti ĉefo. 6. korp parto(R). 7. sekve; konjunkcio. 8. ne toleri(R). 9. esti faranta. 10. ĝi ŝirmas kontraŭ ardo de fajro(R); honora nomo(R). 11. malkonfesi(R); senpieda besto; denove(R).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
2	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
3	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
4	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
5	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
6	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
7	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
8	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
9	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
10	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
11	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■

Vertikale. 1. disiĝo pro malsameco de opinioj(R); ĉevalo faras tion(R). 2. frukto(R); konjunkcio. 3. plibeligi; sovaĝa porko(R). 4. povanta okazi(R); parenco(R). 5. juna sovaĝa besto(R); malfunkcio de motoro(R). 6. prizorgi(R). 7. la anoj de iu kristana religio

(R); perioda reveno de akcentitaj kaj neakcentitaj silaboj(R). 8. vorto per kiu oni signas ion(R); pronomo. 9. aserti ke io estas vera(R); ekzisti(R). 10. gutoj sur vegetaĵoj(R); metalo(R). 11. scienco pri lumaj fenomenoj(R); avenuo(R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G.J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs, Amsterdam-Z.; la membroj de Fl.L.E. aŭ R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 25/IX/1954.

La Redakcio . . .

. . . petas pardonon pro la malfrua apero de ĉi tiu numero. Tion kaŭzis parte erara resendo de materialo, fare de la presisto, parte la laborlavango kiu, la lastajn semajnojn, „frakasis” la redaktoron!

Oni rakontas . . .

...Ke granda kritikisto ĉeestis, kun angla amiko, prezentadon de teatraĵo, verkita de Sacha Guitry. La anglo ridis, seninterrompe, de la unua frazo ĝis la lasta.

— Nu, diris la franco, vi mirigas min! Ankaŭ mi trovis la teatraĵon komika, sed tamen ne tiel kontinue.

— Jesja, estas malsame, respondis la anglo... Vi, vi ja komprenas!

Persa proverbo

„Kiu ne scias kaj ne scias ke li ne scias, estas frenezulo: fuĝu lin...”

„Kiu ne scias kaj scias ke li ne scias, estas infano: eduku lin...”

„Kiu scias kaj ne scias ke li scias, dormas: veku lin...”

„Kiu scias kaj scias ke li scias, estas saĝulo: sekvu lin...”

Ĉu distro?

Juna virino renkontas Einstein:

— Mi estis via studentino, ŝi memorigas al li, kaj iun tagon vi petis ke mi fariĝu via edzino.

— Nu vere, diras la maljuna scienculo, kaj ĉu vi efektive fariĝis mia edzino?

KAPTU LA ŜANCON! DUM SEPTEMBRO VALIDAS ANKORAŬ LA FAVORAJ KONGRESPREZOJ

	gld.
<i>Haarlem, kun multaj fotoj</i>	1,—
<i>Du Majstronoveloj (Storm)</i>	bind 1,65
<i>Batalo de V'Vivo (Dickens)</i>	„ 2,40
<i>Esperanta Krestomatio</i>	„ 1,65
<i>La nevenkebla Ĝeno (Thijssen)</i>	„ 3,90
<i>Nekonata Konato (Boatman)</i>	„ 1,75
<i>Saltego trans Jarmiloj (Forge)</i>	„ 1,75
<i>Judoj sen Mono (Gold)</i>	„ 2,75
<i>La Vojoj estas nekonataj (Kassak)</i>	„ 2,75
<i>Vivo de nia Sinjoro Jesuo</i>	„ 2,70
<i>La Granda Aventuro (Szilagyi)</i>	„ 5,15
<i>Fabeloj de Andersen III</i>	broŝ. 2,30
<i>La Hundo Kruso (Ballantyne)</i>	„ 1,70
<i>Gaja Leganto per Esperanto</i>	„ 0,60
<i>Aŭli (Adamson) Rakonto pri knabo</i>	„ 2,40
<i>Jozef en Dotan</i>	„ 1,25
<i>Problemoj de Lingvo Internacia</i>	„ 0,75
<i>La Konsilanto (Degenkamp)</i>	„ 2,50

Mendu ĉe Libro Servo L.E.E.N., Pythagorasstraat 122, Amsterdam kaj
Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse St.weg, Brugge

Kongreskaheloj mendeblaj po gld. 1,90 ĉe Sierkunst „Klejo”, Gramsbergen-
laan 108, Den Haag